# *Kuba vicprezidento dialogas kun la Nacia Afrika Kongreso*

Image not found or type unknown

**Valdés Mesa dialogas kun NAK**

Pretorio,  jun 20  (RHK) La vicprezidento de Kubo, Salvador Valdés Mesa, parolis ?i tie hodia? kun la vic-generala sekretario de la Afrika Nacia Kongreso (ANC), Nomvula Mokoyane.

En la kunveno amba? gvidantoj rekonis la bonegan nivelon de la dulandaj rilatoj, kun profundaj historiaj radikoj, kaj anka? la ligojn de solidareco kaj kunlaboro inter amba? landoj.

Dum la dialogo, Mokoyane rememoris, kiel la historiaj ligoj inter Kubo kaj Sudafriko dati?as longe anta? la establado de diplomatiaj rilatoj en majo 1994.

Siaflanke, Valdés Mesa dankis, nome de la kuba popolo kaj Registaro, la historian subtenon de Sud-Afriko favore al ?esigo de la ekonomia, komerca kaj financa blokado trudita de Va?ingtono kontra? la kuba popolo.

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/357912-kuba-vicprezidento-dialogas-kun-la-nacia-afrika-kongreso](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/357912-kuba-vicprezidento-dialogas-kun-la-nacia-afrika-kongreso)

**Radio Habana Cuba**